

Modela laboro en biblioteko de Oslo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 599/94-1, 1982 julio 08 kaj 10.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-94/SRI-1982-94-1-599-Claude-kaj-Andree-GACOND-Modela-laboro-en-biblioteko-de-Oslo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Sub la titolo BIBLIOTEKAJ INFORMOJ aro da esperantistoj bibliotekistoj komencis interŝanĝi leterojn, esperante, ke tiuj ĉi skribaj rilatoj, kiuj estas multrilate pli interesaj ol tiuj, kiujn revueto povus alporti, favoros la reciprokajn kaj fakajn riĉiĝojn. Kiel arkivisto de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri Lingvo Internacia (CDELI) mi havis la honoron esti invitita partopreni en tiu ĉi agado, kiu jam alportis al mi multajn utilajn informojn. Ĝus alveninta biblioteka informo estas fakte citinda, ĉar ĝi donas tre interesajn sciigojn pri la esperanto-literaturo, kiu troviĝas en la Universitata Biblioteko en Oslo. Dissendis tiun ĉi cirkuleran leteron la bibliotekisto T. A. HOEG. Jen ni citas al vi tion, kion diras tiu ĉi raporto:

A.- En la Universitata Biblioteko en Oslo nun troviĝas du esperantlingvaj librokolektoj:

Cl.- Unue: la librokolekto de la biblioteko mem

A.- Due: la librokolekto de Norvega Esperantista Ligo (NEL).

Cl.- Studenta Esperanto-Societo, en Oslo, eldonis en 1973 bibliografion pri interlingvistika literaturo en la Universitata Biblioteko. La listo enhavas 667 numerojn. Kelkajn el tiuj ĉi libroj kaj broŝuroj la biblioteko siatempe aĉetis. Aliaj estas donacoj. La bibliografio ne ampleksas artikolojn en revuoj, gazetoj, klubbultenoj, ktp. Aliflanke ĝi registras literaturon ankaŭ pri aliaj planlingvoj ol esperanto, ekzemple Alt-teutonik, Anglic, Bahm, Blua Lingvo, Frater, Hom-idyomo, Ido, Intal, Interlingua, Lips-Kith, Novial, Occidental, Spokul, Suma, Volapük kaj Wede."

A.- Interrompante tiun ĉi citaĵon ni rimarkigas, ke estas ĝenerale konstatebla fakto, ke kiam biblioteko ekregistras esperanto-verkojn, al tiu ĉi katalogo ĝi aldonas la librojn kaj revuojn aperintajn en aliaj planlingvaj projektoj ol esperanto. Tio vigle atestas, ke almenaŭ bibliografie esperanto kaj la aliaj projektoj de internaciaj aŭ universalaj lingvoj skemaj aŭ naturalismaj estas intime ligitaj, ke la esperantistoj tion ĉi ŝatas aŭ ne. Sed ni revenu al la raporto de la bibliotekisto Hoeg, kiu rakontas pri la situacio en la Universitata Biblioteko en Oslo. Ni ree citas:

Cl.- "Multe pli granda estas la librokolekto de Norvega Esperantista Ligo. Pro manko de spaco la Ligo ne havis sufiĉe da loko por siaj libroj. En la jaro 1947 ĝi tial faris kontrakton kun la Universitata Biblioteko laŭ kiu oni deponis la librokolekton de NEL en la Universitata Biblioteko.

A.- Oni metis la librojn en grandajn kestojn, kaj tie ili restis dum ĉirkaŭ 25 jaroj. Neniu rajtis prunti la librojn. Tiu aranĝo, farita per la helpo de la tiama universitata bibliotekisto, nun la estro de la Biblioteko de Deichman en Oslo, Hans Fløgstad, savis la librokolekton. Literaturo eldonita post 1947 deponiĝis ĉe diversaj membroj de Klubo Esperantista en Oslo.

Cl.- Nature, oni esperis iam havi la eblecon uzi la librokolekton, kaj meze de la 1970-aj jaroj oni malfermis la kestojn kaj surbretigis la librojn. Temis pri proksimume 2500 libroj kaj pli ol 400 revuoj, pli malpli kompletaj.

A.- Poste oni ellaboris alfabetan kaj Dewey-sisteman katalogojn."

Cl.- Tiun ĉi laboron faris s-ro HOEG, kiu raportas, kun du gejunuloj, el kiuj unu ne estis esperantisto, sed li deziris kunhelpi.

A.- Poste s-ro HOEG parolis pri la biblioteko en la klubo, kaj multaj malnovaj esperantistoj estis pretaj kunlabori por registri tiujn kajerojn aŭ numerojn de la diversaj gazetoj kaj revuoj la biblioteko ne havas.

Cl.- Unu fojon ĉiusemajne dum la vintra duonjaro inter 6 kaj 8 esperantistoj renkontiĝis en la biblioteko, kie ili laboris energie dum du horoj.

A.- Unu el la partoprenantoj havis 80 jarojn kaj ne estis aktiva esperantisto dum la lastaj 40 jaroj, sed nun li anoncis sin por helpi la movadon. Kiam ili finis la laboron, li diris: Estas bedaŭrinde, ke la laboro finiĝis. Mi tre ŝatis tian aktivecon".

Cl.- Denove montriĝis, aldonas s-ro HOEG, ke nia movado povas funkcii ankaŭ kiel socia medio kaj por junuloj kaj por maljunuloj, se oni havas taŭgajn taskojn por ili.

A.- Antaŭ kelkaj monatoj s-ro Rolf Bugge-Paulsen, kiu nun vivas en maljunulejo, transdonis sian grandan kolekton de esperanto-literaturo al la Universitata Biblioteko en Oslo. Li posedis verŝajne proksimume 2 mil librojn kaj multajn gazetojn. Kaj la laboremaj esperantistoj nun ordigas la librokolekton. Ĝi ampleksas ankaŭ librojn, kiujn s-ro Rolf Bugge-Paulsen siatempe heredis de gesinjoroj Sletterød kaj de s-ro H. Bonnevie. Alivorte, ĝi enhavas interalie librojn kaj broŝurojn presitajn en la komenco de nia jarcento.

Cl.- Konklude s-ro Hoeg ankoraŭ diras, ke estas tasko por la grandaj esperanto-bibliotekoj iamaniere faciligi la eblecojn trovi la interesajn artikolojn per katalogoj, presitaj aŭ alireblaj per komputero. Li ne scias, kiujn planojn UEA havas sur tiu ĉi kampo en Roterdamo, Antverpeno aŭ Budapeŝto, sed ĉar la Universitata Biblioteko en Oslo posedas komputeron, li diskutis kun la estro de la biblioteko la eblecon uzi la komputeron por atinigi sian celon. Li mem senpage kaj post la ordinara labortempo devas enmeti la materialon en la komputeron, sed la biblioteko kovros la ceterajn elspezojn, kiuj estos sufiĉe altaj.

A.- Se esperantistoj en Oslo estos pretaj denove helpi la movadon, la laboro povos komenciĝi venontaŭtune, kaj post nur mallonga tempo eaperantistoj kaj esperanto-institucioj ĉie en la mondo povos aŭ havi rektan kontakton kun la biblioteka komputero en Oslo kaj serĉi la esperantlingvan literaturon en ĝi aŭ skribi petante kompletan liston de la enmetita literaturo.

Cl.- Jen fakte aktiveco, kiu tre similas al tiu, kiun ni efektivigas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds favore al la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI). Kaj ni estas certaj, ke en aliaj urboj sindonemuloj same laboras. Bedaŭrinde tre ofte mankas informoj pri ilia aktiveco.

A.- La savo kaj katalogado de esperanto-dokumentaroj estas afero ege grava. De ili grandparte dependas la dinamismo mem de esperanto. Scienca serĉado, primovadaj esploroj, verkado de eseoj, beletra aktiveco viglas, nur kiam ili estas helpataj, kaj unu el tiuj helpoj estas la ekzisto de bone dokumentita biblioteko. La aliaj naciaj esperanto-societoj agu kiel Norvega Esperanto-Ligo kaj instigu agemajn esperantistojn helpi, ke la stokitaj libroj ne restu eterne en kestoj, sed kontraŭe fariĝu konsulteblaj de kiel eble plej vasta publiko.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la modela poresperanta laboro, kiu efektiviĝas en la Universitata Biblioteko en Oslo. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*